# Paralela Universo kreskas

Dima Ŝevĉenko

*Paralela Universo* estas unutaga festo de Esperanto, okazanta unu fojon jare, en la dua parto de aŭgusto. La eventoj povas havi tute diversan formon kaj programon, kiu daŭras averaĝe 8 horojn dum la tago. Iuj eventoj povas konsisti nur el komuna tagmanĝo, libera babilado, turismado tra la naturo, la aliaj povas enhavi koncertojn en Esperanto, prelegojn, konversaciajn rondojn, seminariojn ktp. La ĉefa trajto estas tiuj eventoj en diversaj lokoj de la mondo samtempe, formante kvazaŭ grandan unutagan Mondan kunvenon de esperantistoj. Modernaj teknologioj ebligis ankaŭ *konferenc-pontojn* inter la eventoj, kiuj pligrandigis la efikon de la ĉeesto en pluraj lokoj samtempe.

Ĉi-jare Paralela Universo, okazanta la 19-an de aŭgusto, estis aparte multnombra kaj varia pro aliĝo de novaj landoj kaj urboj. Ekzemple, ni okazigis la unuan fojon tiaspecan aranĝon en Rusio. En Moskvo la aranĝon, kiu daŭris sume preskaŭ 10 horojn, partoprenis 19 esperantistoj el 4 landoj. Kadre de ĝi okazis prelegoj, koncertoj, skajpa konferenco kun la paralela evento en Kopenhago kaj multo alia. Dum la tuta aranĝo oni parolis nur en Esperanto.

Ĉi-jare, la 19-an de aŭgusto, sume okazis 35 eventoj en diversaj urboj (25 en 2016), kiujn partoprenis 322 esperantistoj (231 en 2016).

Se via Esperanto-grupo ankoraŭ ne partoprenas, aliĝu sekvan jaron ankaŭ vi!

Pliajn detalojn vi povas trovi en la retejo *https://paralelauniverso.com.*


Novjorko, Usono


Toronto, Kanado


Santiago de Cuba, Kubo


Sankta Moniko, Usono


San-Francisko, Usono


Moskvo, Rusio


Aŭstino, Usono



Berno, Svislando


Goiânia, Brazilo



Dos Aguas, Meksiko


Montrealo, Kanado